

TEA-BULTENO

19^A JARO - N° 129

JANUARO - FEBRUARO

N. 1-2/2016

Neniu kiu vere mastras sian lingvon povas superregi alian.
George B. Shaw, dramverkisto (1856-1950)

Karaj Geamikoj!

Tutkorajn bondezirojn je Serena kaj Paca 2016^a Jaro
Antaŭ ol komenci la unuan ĉi-jaran Bultenon, mi tralegis, rapide, la pasintjaran. Ne por elsuĉi inspiron, nur simple ĉar signifa estus iu gurda ripetiĝo.

Bedaŭrinde la situacio monda ne multon ŝanĝiĝis depost la 2015^a, eĉ ĝi preskaŭ 100-procente plimalboniĝis pro la bone konataj tristigaj eventoj. Plenplenas la amaskomunikiloj je anoncoj pri murdoj, militatakoj, bombadoj, drono de infanaj kaj plenkreskaj enmigrintoj, por ne paroli pri senfinaj trompaĵoj, ĉiunivelaj, ĉiulandaj koruptecoj, manko de la plej baza, privata kaj instanca, moralo; ŝajnas ke en la lastaj tempoj ĉiu homo konsideras ĉiun alian, eĉ la najbaran, sia persona malamiko. Kie estas solidareco? Kion signifas amo kaj respekto? Ĉu tiuj vortoj apartenas ankoraŭ al niaj vortaroj? Ĉu vere iom post iom ni malhomiĝas?

Sed ni rigardu iomete al alia flanko de tiu problemaro:

kiom da homoj, proprariske, proprakoste, volontule, entute sin fordonas al kuracado, savado, protektado, prizorgado de aliaj similuloj, al satigo kaj sensoifigo, ĉu en fora Afriko ĉu siaurbe, en la kampoj sanitara kaj sociala, en malliberejoj, en malsanulejoj, por helpi maljunulojn, mizerulojn, orfojn, forlasitojn, enmigrintoj ktp ktp.

Jes, tiaj homoj ankoraŭ ekzistas, kaj plimultiĝas (bonŝance!), kaj agadas, ne farante al si laŭtan reklamadon, en tiu tuthomaranisma maniero por la bono de la aliaj: ja, tiaj homoj ne "indas" esti temo de sensaciaj artikoloj, ĉar neatentokaptaj por la legantaro, tial pri ili oni prisilentas.

Nu, sufiĉas, tia la monda situacio, pri kiu nenion novan mi povis rakonti. Tial ni egoisme ĵetu rigardon en nian etan Esperanto-mondon, tute aliteme kaj nur loke, kaj pensu ekz. kiel TEA povas ekplani sian estontan agadon!

Malfacila estas la momento, kaj por la unuopaj personoj kaj por la kulturaj asocioj, sed laŭ ebloj kaj cirkonstanc-

oj ni klopodu tamen ion fari. Jam en januaro io okazos: prezento de la libro "Kiam ekfloras la migdalarbo..." *Poeziaĵoj triestdialektaj tradukitaj al Esperanto*, en la librejo LUGLIO, Galerio Rossoni, sabato la 16^{an} de januaro 2016 je la 17h30. Partoprenos 5 el la 6 triestaj aŭtoroj kiuj kontribuis per 26 versaĵoj. Ni varme invitas vin ĉeesti tiun ĉi gravan eventon. Eblis eldoni la libron danke al la subteno de la Regiona fako pri protektado de minoritataj lingvoj.

Plie memorigendas ke en 2016 nia/via **Triesta Esperanto-Asocio** iĝos **110-jara**.

Tiu ĉi datreveno nepre estas festinda de ni ĉiuj: nia asocio havas malantaŭ si gloran pasintecon, malgraŭ ke gravaj malfacilaĵoj kaj obstakloj troviĝis sur ĝia vojo. En majo realiĝos alia programero, nome la aranĝo de ekspozicio pri Esperanto en la Poŝta kaj Telegrafa Mezeŭropa Muzeo (placo *Vittorio Veneto*).

Por scii iom pli, venu al via Asocio kaj proponu vian kunlaboron! Ni atendas vin!

Via Elda

Ni lernu legi la nutraĵ-etikedojn

Nuntempe esti bona dommastrino ne tiom simplas, speciale kiam oni devas aĉeti en superbazaroj la diversajn manĝaĵojn. 'Kial?' – eble vi demandos. 'Nu, pli ol iam tiu faro ne donas tiom da problemoj. Vi rigardas la bretojn, kie oni ekspozicias bonorde laŭ la speco la nutraĵojn (ĉu temas pri pastaĵoj, aŭ enskatolitaj legomoj, aŭ oleo el olivoj aŭ aliaj el diverstipaj semoj, plurspecaj farunoj, dolĉaĵoj ktp ktp). Tiuj krome, estas ankaŭ dividitaj laŭ la produktantoj, por doni al klientoj pli da elekto, ĉar la artikloj povas esti prilaboritaj de diversaj fabrikmakoj'. Do, oni povas decidi inter la plej ŝatata aŭ plej reklamataj, aŭ la malplej kostaj, aŭ male la plej kostaj, kiuj supozeble donas pli da garantio pri bongusteco kaj laŭleĝa kaj honesta nefuŝa traktado de la nutraj elementoj... Certe ĉio ĉi estas bone konata de iu ajn, nun: ĉiu lerta kaj sperta mastr-



Informoj	
Energio	454kJ
Proteino	8,0g
Graso - sat	0,5g
- nesat.	0,4g

ino scias bone kiel aranĝi la aferon, por tute "akordigi" kaj monujon kaj bonecon de la manĝvaroj surtabligotaj al familianoj. En la tuta afero grave ludas sana prudento. Sed kio helpas al aĉetanto trovi tion kio plej taŭgas, kio plej konformas al la reguloj de respekto pri sano, higieno, bonkvalito, medio ks? La etiketoj gluitaj al aŭ presitaj sur la tegilo de la diversaj nutraĵoj (kartono, lada aŭ vitra vazo, plastaj envolvajoj ks). Do, estas iu fama ĉina diraĵo ke "oni estas tio kion oni manĝas" kaj oni manĝas kion oni legas sur tiuj etiketoj... kiuj foje priskribas la enhavon en komprenebla kaj plenkompleta maniero, alfoje donas nur supraĵajn klarigojn, kies senco ne plene kapteblas.

Laŭ leĝa regularo, iuj informoj estas devigaj kaj devas sekvi iajn indikojn, dum aliaj estas nedevigaj. El ĉio ĉi eblas dedukti, ke etiketo estas

valora 'aliancano' de la konsumanto.

Leĝe, la difino de etiketo por nutraĵoj jenas: "ĝi estas tiu aro da priskriboj, indikoj kaj fabrikaj aŭ komercaj markoj, bildoj aŭ simboloj rilataj al la nutraĵo, kiu troviĝas sur la skatolo aŭ ujo aŭ sur la transportdokumentoj". La precipa kialo de ekzisto de etiketo estas ĝuste informi la konsumanton pri la efektivaj karakterizoj de la komerca produktaĵo, por helpi la alcelan elekton. Ĝiaj esencaj kvalitoj estas: komprenebleco, legebleco (dimensioj de tiparoj kaj adekvata grafiko) kaj neforviŝblo. Laŭ tiaj kriterioj, la produktanto atente devas citi ĉefe la sekvajn specifecojn: marko, origina nomo, senlikvaĵa pezo kaj neta kvanto.

Gravas ankaŭ la deveno de la produktaĵoj, kio devas esti klare evidentigita. Kio dirita rilatas la enpakitajn nutraĵojn, alia afero estas pri la vendataj nutraĵoj ne jam enpakitaj, kiaj fruktoj, legomoj, freŝaj viandaĵoj, pano, fromaĝoj, peklitaĵoj, ks, kiuj estas eĉ pli submetataj al ampleksaj kontroloj, precipe koncerne urban/landan devenojn, konservmetodon, liston de ingrediencoj, informojn por alergio-suferantoj, limdaton de konsumado ks.

Ĉio ĉi estas tre supraĵa klarigo pri la multaj normoj, reguligantaj la vendadon de nutraĵoj. Jam de jaroj, mi kredas en ĉiu lando, eblas ricevi bonkvalitan kaj honestan informadon pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kvankam fojfoje ekaperas artikoloj kiuj atentigas pri fuŝaĵoj faritaj de fabrikoj, ne respektintaj la higienajn priskribojn, aŭ pri varoj enhavantaj eĉ danĝerajn kemi-elementojn, aŭ pri mensoga misprezento de la kvalito de manĝaĵo. Trompoj en la nutro-kampo okazas tre ofte kaj plej kredeble ĉie tra la mondo. Kion oni devas fari antaŭ ol aĉeti? Almenaŭ bone kaj atente legi tiujn etiketojn, kun espero ke kio estas tie skribita egalas al la vero.

Nuntempe ni ĉiuj klopodas vivi kiel eble plej sanan vivon, kontrolante ne manĝi tro da graŝoj, da sukeroj, prefere prezenti surtable multajn fruktojn kaj legomojn, manĝi - se eblas - pastaĵojn kaj panon integrajn, ne tiom aĉeti - precipe por infanoj/knaboj - keksojn, biskvitojn, kukaĵojn, dolĉaĵojn industrie produktitajn, sed en iom da libera tempo mem klopodi tiujn kuiri. Mi multon fakte legis pri la oleoj el palmo (48% da saturita graso) kaj el palmaj semoj (82% da saturita graso), el kokoso (90% da saturita graso), kiujn oni trovas en ĉiaj dolĉaĵoj fabrike produktitaj. Estas tre interesa ĉi tiu argumento, pri kiu oni ankoraŭ tre diskutas, sen atingi ian komunan opinion. Estas mia intenco paroli pri tiuj ĉi oleoj - kun espero ke vi trovos tion ĉi interesa - kun ekspliko de la proa kaj malproa argumentado.

Nun ni vidu la sistemon alprenitan en pluraj landoj (en Italio ĝis nun tre malmulte uzatan), por igi pli facile komprenebla por konsumantoj la legadon de tiel diritaj 'inteligentaj etiketoj'.




Kiel tiuj funkcias? La inteligentaj etiketoj ŝanĝas sian koloron se la produkto tro da tempo restis ekster la fridujo aŭ se la enhavo eksvalidiĝis, ĉar preter la tempolimo. Alia ekzemplo: danke al tiuj etiketoj eblas tuj kompreni, se la produktaĵo - ekde sia enpakiĝo je 4-grada temperaturo - estis submetata al pli altaj temperaturoj, dum kiom da tempo, kaj fine se tio povas esti danĝera al la homa sano. Tiu etiketo - kromato-termika - estis farita de esploristoj el la Departemento pri scienco de materialoj en la Universitato *Milano-Bicocca* [elp. *Bikokka*] kun la kolegoj de *Imperial College*.

Mallonge: la etiketo estas membrano el porca silico sur kiun estas metita kolora substanco speciale programita por igi ĝin senkolora je 4-grada temperaturo. Tiu pigmento tia restos, se temperaturo (ekzemple de jogurto, fromaĝo, lakto aŭ frukta suko) restos stabila; se kontraŭe la temperaturo plialtiĝos ĝis iĝi 9-grada dum 30 minutoj, la substanco alprenos lazuretan koloron; se fine la temperaturo plu-altiĝas, ĝis atingi medio-temperaturon, post 3 aŭ pliaj horoj, la koloriĝo ŝanĝiĝas al malhela bluo. Tiu vario estas neinvertigebla, konsekvence produktantoj, vendistoj kaj konsumantoj povas sekvi la spurojn de eventualaj dumvojaj akcidentoj kaj kontroli ĉiam la historion de la unuopaj preparaĵoj. Vere tiu sistemo estas eksterordinara kaj utiligenda, malmulte-

Trafoliumante libron pri historiaj rememoroj

Novo aŭ malnovo...?

Polemikemaj artikoloj kaj indignaj leteroj de legantoj plenigas en ĉi tiuj tagoj la paĝojn de la loka tagĵurnalo "Il Piccolo" (La Malgrandulo) pri iu nova, grandioza projekto, proponita de la nuna komunuma regantaro, kun ĉekape la urbestro, realigota (eble!) venontjare. Notindas, ke printempe 2016 okazos balotado, tial urĝas - por la proponintoj - ke la afero estu aprobita antaŭ la elektoj. Pri kio temas? La intenco estas, redoni la originan aspekton al iu parto de nia urbo, tia kia ĝi estis antaŭ precize 81 jaroj. En Triesto estas kanalo, la Granda Kanalo, kiu ĝis 1934 longis ĝis atingi la *pro-nao*-n (templo-vestiblon) de la katolika preĝejo Sankta-Antono. Laŭ la urbestro, gravas ke tiu



Bildo de la Granda Kanalo (1920^{aj}-j.)
Dekstre, esperantlingve

zono ricevu la antikvan fizionomion kaj la originan longecon, ankaŭ ĉar la aktuala aranĝo de la antaŭstaranta placo havas tre mizeran aspekton: tie estas eta ĝardeno neniam bele prizorgita - sed pri tio kiu kulpas? - kaj sensignifa fontano-baseno kun lazuraj fundo kaj parietoj.

Antaŭ ol rakonti iom da historio pri la tuto, mi preparolu pri la opinioj, kontraŭaj kaj favoraj, de la triestanoj. La tagĵurnalo pridemandis vidpunkton al 5000 urbanoj: el tiuj 51% estis favora al plilongigo de la kanalo, 47% malfavora kaj 2% sindetena. Estis interese legi la kialojn: kelkaj - nefavoraj - akcentis la fakton, ke anstataŭ elspezi tiom da mono, estus pli bone restaŭri la restaĵojn de la romiaj domoj, la urbajn fontanojn, la ĝardenojn troviĝantajn en forlasita stato, ripari la stratojn truoplenajn, kiuj faligas precipe la gemaljunulojn, renovigi galerion kiu baldaŭ falos sur la trairantajn aŭtomobilojn, dum la favoraj - iom relevantaj pri l' pasinteco, kiu ne plu revenos - aplaudis ĥore la inteligentan proponon, asertante ke finfine tiu urboparto retrovos sian mirindan brilon, ke certe tio allogos amason da turistoj, kaj iu, kun ia poeta vervo, eĉ diris, ke "Ho, bonege estus! Revidi tiun belegan perspektivon de la akvo eniĝanta rekten inter la domojn kaj la elegantan novklasikan fasadon de la preĝejo reflektiĝantan en la kanalo." Aliaj, pli bone informitaj, plurfoje atentigis, ke

ne temas pri mono de triestanoj, sed pri kapitalo asignita de Eŭropa Unio por la renovigo de historiaj zonoj, kiun - se ne utiligotan - oni perdos. Kiel ajn, tamen mi ne scias kion diri tiurilate. Ekestas pluraj duboj: ĉu vere estas je dispono la mono de la eŭropaj civitanoj por restaŭri tiun parton, aŭ vere ekzistas la risko forĵeti por tiu projekto multegan monon, elprenotan el la mizeraj komunumaj kaso, kio malhelpos alfronti pli urĝajn problemojn de la urbo? Kio ankaŭ tre ŝancelas min, estas ke en la pasintaj jaroj pluraj aferoj estis restaŭritaj, refaritaj, plibonigitaj, en Triesto, sed ... krom la fakto ke plejofte la elspezoj tre superis la komencajn buĝetajn, sekvis ke la laboroj ne estis faritaj laŭ ĉiuj normoj, kaj post kelka tempo ĉion oni devis refari... Do, kromaj elspezoj, procezoj, ktp ktp. Nu, certe mia opinio neniel povas influi tion kio estas jam decidita, tial, se fakte tiu ŝanĝo aŭ, pli bone dirite, tiu restarigo de la malnovo plibeligos mian urbon, fine ankaŭ mi estus kontenta.

Nun iom da historio pri "el Canal Grande" (la Granda Kanalo).

Ni vidu tutunue la kialojn de la enterigo de tiu kanala parto. La precipa celo estis krei "triumfan vojon" kunligantan Placon Oberdan kaj Placon Hortis. Nova, vasta, larĝa strato laŭ kiu la centurianoj kaj rotoj de la faŝisma reĝimo estus marŝintaj parade antaŭ la konstruenda 'Sidejo de la faŝista partio', la nuntempa kvestorejo. Fronte al la kolonoj de la Sankta-Antona-preĝejo, anstataŭ marakvo kaj barkoj, ekaperis placo, kiu origine estis titolita laŭ la Savoja reĝo Umberto la 1^a. Neeviteble estis donitaj al la triestanoj la "oficialaj" motivoj pri tiu enterigo de la fina kanala parto: krom tiu "reĝima", la tiutempa komunuma estraro klar-



Tre interesa poŝtkarto (1906) speciale por la TEA-anoj: videblas velbarko kun esperanto-stela flago

igis, ke tiu projekto servas al plibonigo de la higienaj viv-kondiĉoj favore al la tuta urbanaro. Fakte la fina parto de la kanalo, pro malsufiĉaj fluso kaj refluso de la tajdo, fariĝas, ĉefe somere, deponejo de ajnaj rubaĵoj, kiu sekve iĝas granda kolektejo de kuloj, por ne

paroli pri la naŭza fetoro el tie eliĝanta. Kaj, por pli konvinki la plej obstinajn, oni substrekis la bezonon pliordigi en pluraj stratoj la *haosan* trafikfluan de veturiloj (tiutempan!!!). En la antaŭaj monatoj estis tamen propono enterigi eĉ la tutan kanalon, de la preĝejo ĝis la maro, sed ĝi ne ricevis la aprobon de la komunuma administracio.

La laboroj komenciĝis aŭguste 1934. Por plenigi tiun akvan spegulon, kie siatempe albordegis la granddimensiaj velŝipoj, oni enĵetis la ruinaĵojn de la domoj situantaj en la hebrea getto, kiuj estis detruitaj per la "resaniga pioĉo" enkadre de giganta 'eksproprietigo' de nemoveblaĵoj, kunligita al deportado de sep mil - ok mil judoj. Estis tiel nuligita, detruita, reto de amikaj kaj solidaraj interrilatoj, maturiĝintaj dum jaroj kaj jaroj de najbara kunvivado; forigitaj estis malnovaj domoj, malaperis labirintoj de vojetoj interdomaj; devige fermitaj estis vendejoj, magazenoj, etaj metiejoj. En 1937 eĉ la Sinagogo, troviĝinta centre de la juda kvartalo, estis ĝisfundamente ruinigita. En tiu areo oni ekkonstruis la palacon de la Ĝenerala Asekur-Kompanio, Sidejo de la faŝ-

ista partio, Napola Banko.

Sed ni revenu al la Granda Kanalo: kompreneble la laboroj estis sekvataj de la urbanaro ne nur per surloka ŝtelrigardado, sed ankaŭ pere de artikoloj publikigitaj en la tagĵurnalo. Antaŭ ol komenci la plenigadon, kompreneble oni devis elfosi la dikitan tavolon da koto per dragilo, por poste daŭrigi per fostigado, kio estas bezonata ankaŭ kiel bazo de betonaj masoj, por ĉirkaŭlimigi tion kio restos de la kanalo. Fakte oni devis elfosi ĝis kiam la suba grundo donis sufiĉan solidecon. Estis interese legi tiujn detalajn artikolojn pri la uzita sistemo. Kiam estis finita la tuta laboro, oni ektransportis per grandaj ĉaroj la domajn rubojn kaj ilin enĵetis en la kanalon, en la kotecan akvon.

Je tiu punkto ekaperis problemo: ŝajne la materialo devenanta el la malkonstruo de tiuj domoj, ne estis sufiĉa por plenigi tiun parton de la kanalo... Sed bedaŭrinde oni ne klarigis, kiamaniere estis superita tiu obstaklo! Certe oni decidis detruo aliajn kadukajn domojn... Kio certas, estas ke la triestanoj tre amuziĝis rigardante la disvolvigon de tiuj aranĝoj kaj dum la tuta tago staris ĉiam

multaj scivolemuloj antaŭ la fendoj faritaj en la latbariloj ĉirkaŭantaj la kanalon.

Se oni decidus realigi tiun projekton, estos interese observi la farotaĵojn tra la alcele malfermitaj truoj en la ĉirkaŭbariloj, precipe por malkovri kiajn "trezorojn" oni elfosos. Unu fakte vere troviĝas funde de la kanalo: temas pri iu malgranda torpedoŝipo el la jaro 1917, tiutempe ankrita ĉe la kanalo, pro difekta motoro, kaj tie forgesita. Post kelkaj jaroj ĝi sinkis kaj - intence aŭ neintence - estis surŝutita per amaso da morterruboj. Pliaj informoj pri ĝi troveblas en la TEA-Bulteno jan-febr 2013.

Ho, mi forgesis informi vin pri la probablaj (ne definitivaj) kostoj de la projekto: nur ... tri milionoj da eŭroj!

Arkitekto, inĝeniero, du ĉefoj de la komunuma administracio kaj eĉ universitata docento estos alvokitaj por taksii la prezentotajn projektojn.

Do, mi atendas la rezultojn. Ĝis nun ankoraŭ mi ne kapablas objektivaj juĝi la tuton: ĉu ni reiru al malnovo? Jes, eblas, se ekzistas sufiĉaj rimedoj, sed tio vere alportos pozitivajn efikojn aŭ per tio ekos novaj, neantaŭviditaj, problemoj? Ni vidos...



- La libro "Politikisto, ĉu honestulo?" Tien, dekstren, en la scienc-fikcia sekcio...

EL NIA MONDO!

Listo de retaj Esperanto-kursoj ĉe:

<http://tinyurl.com/lingvolerniloj>

Tie troveblas retaj vortaroj, aŭtomataj tradukiloj, lingvoludoj, kartaroj por vortolernado, perado de instruistoj kaj konversaciaj partneroj ktp.

Konstateblas, ke 90% de la retaj senkostaj lingvopaĝoj kun almenaŭ 25 lingvoj havas nun ofertojn ankaŭ en Esperanto. Kial? Nu, eble tiu ĉi prelego helpas klarigi la kaŭzon:

<http://www.esperantoland.org/dosieroj/LaLongaVosto.pdf>

Informis Lu Wunsch-Rolshoven tra RetInfo, LS




Programo de la franca E-kulturdomo en kastelo Greziljono: Vidu daŭran agendon en

www.gresillon.org/agendo

2016-aprilo-10/17: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj, vidu

www.gresillon.org/printempas



Ne povas manki sur via bretaro ĉi interesege itallingva libro "J.R.R. Tolkien la esperantista. Antaŭ la alveno de Bilbo Baggins". En ĝi eseoj de la aŭtoroj Oronzo Cilli (italo), Arden R. Smith kaj Patrick H. Wynne, usonaj esperantistoj. Interne estas ankaŭ kontribuajtoj de Renato Corsetti kaj Tim Owen, sekretario de la Brita Esperanto-Asocio, kun enkonduko de la angla John Garth.

Paĝoj 160; kosto - 15,00 €.

Pliajn informojn donas: info@cafagnaeditore.it

De paĝo 2-a

kosta kaj efika. Notindas, ke ĝi povus esti bona ilo por redukti la nutraĵo-malŝparon.

Espereblas, ke baldaŭ la "inteligentaj etiketoj" estos vaste alprenitaj ankaŭ en mia lando kaj en tiuj kiuj ne ankoraŭ uzas ilin.

Similan funkcion eblas apliki ankaŭ kiam oni malfermas la pakadon: se oni uzas iun plastan membranon, aktiviĝantan en ĉeesto de karbondioksido (NO₂) kaj tial ŝanĝantan la koloron, kiam unuafoje oni malfermas skatolon aŭ ujon, dum la tempopaso tiu membrano informas la konsumanton, ĝis kiam oni povos manĝi/trinki la produkton. Tio evitas la forĵeton de la varo en la rubujon.

Plej laste estis ankaŭ faritaj, por malhelpi la volan difektadon de la limdatoj de uzebleco, etiketoj kiuj ŝanĝas sian koloron surbaze de la amoniaka nivelo ĉeesta en tro malnova nutraĵo. Kiam estas superita la tempolimo, ne plu legeblas la strikodo kaj tial ne plu eblas vendi la varon.

Ŝajnas al mi, ke la metodo estas tre bona kaj valida, por protekti la nutraĵojn kaj la sanon de konsumantoj. Kaj jam tio, en ĉi epoko kiam skandaloj pri manĝaĵoj preskaŭ ĉiutage, estas tre grava por ni ĉiuj.

Cerbotiklilo 64

Liveri

Per enŝovo de la tri silaboj de la supra vorto post la unua silabo de la ses subaj, eblas estigi samnombrajn novajn vortojn. Atentu: sama silabo uzeblas nur en paro da novaj vortoj.

AĜO - BALO - BRETO

KAFO - OFICO - SERO

Belan premion ricevos la solvanto de tiu ĉi cerbotiklilo. Solvo aperos en la venonta Bulteno.



Januara Programo

5a, mardo	17h00 - Ekspozicio pri desegnaĵoj de infanoj pri Krisnasko
8a, vendredo	17.30 - Prezento de libro de Edda Vidiz, Librejo Luglio - Galleria Rossoni 20h00 - Pri Bruno Migliorini, de Carlo Minnaja
12a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
15a, vendredo	20h00 - Daŭrigo de la prelego itallingva de Davide Astori "Poesia"
16a, sabato	17h30 - Prezento de la libro "Kiam ekfloras la migdalarbo..." - Triestaj poeziaĵoj tradukitaj al Esperanto, ĉe Librejo Luglio, Galleria Rossoni.
18a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Konkurso pri pentrado 2015
19a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
22a, vendredo	20h00 - Ni ludu per vortoj! (vd. je paĝo 5 ^a - TB-nov.-dec. 2015)
26a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
29a, vendredo	20h00 - "El miaj rememoroj" - de Paŭl de Lengyen

Febbruara Programo

2a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
5a, vendredo	20h00 - Legado de la impona verko de Carlo Minnaja "Historio de la Esperanta Literaturo"
7a, dimanĉo	10h30 Ĝenerala TEA-Asembleo Sekvos komuna tagmanĝo
9a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
12a, vendredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Niaj programoj en 2016 20h00 - Trafoliumante PIV-on
16a, mardo	14h40 - Esperanto en alirprogramo Rai Uno: 9 minutoj kun ...
19a, vendredo	20h00 - Bildoj por lerni
23a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
26a, vendredo	20h00 - Tago de la Patrino Lingvo, kun Edda Vidiz

BULTENO DE TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 17-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;
www.karstajtagoj.altervista.org

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 7^{an} de februaro 2016 je la 10h00, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2015:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*)
 - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Giuseppe Valle*)
 - d) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 7^{an} de februaro 2016.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone!

Okaze de la Asembleo eblas pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).